

## & La leporo kaj la testudo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por "Konfeso" kaj simila rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 Nomis la leporo moke ; la testudon pigra, lama. ; Tiu kriis: "Ej! Aroge ; vantas vi, kuristo fama,

(×:; **Zorgojn ĝi foje forgesas ; Ĝi pri kuro tro promesas ; Ĉu testudon venkus ĝi ; Zorgojn ĝi foje forgesas.**)

'2 tamen, se ni kurus vete, ; mi vin certe venki povus." ; "Buŝe!" — diris mokridete ; la leporo — "ĉu ni provus?" .....

'3 "Jes!" konsentis la testudo, ; ili do la provon faris. ; La spektaklon de l' vetludo ; multaj bestoj ĉirkaŭstaris. ....

'4 Vulp' aranĝis la aferon ; Ĝi de arb' ĝis alta fosto ; signis rektan karieron, ; signis starton per la vosto. ....

'5 La testudo sciis certe, ; ke per kruroj sen elasto ; ne galopas ĝi tro lerte, ; do ekiris sen prokrasto. ....

'6 La leporo firme fidis ; je la granda krur-facilo, ; do ĝi tute ne rapidis, ; eĉ ekdormis en trankvilo. ....

'7 Ĝi vekiĝis ... hop ... ekkrie ; la aeron sage fendis, ; estis jam en cel'. Sed tie ; la testudo ĝin atendis. ....)